

## Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 7-an de oktobro 2021 per Zoom

### Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Marianne Lund kaj, ekde punkto 4, Kjell Peder Hoff.

### 1. Tagordo

Oni aprobis la tagordon.

### 2. Protokolo de la kunsido 02.09.2021

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Marianne korektos skriberaron en ĝi.

### 3. Akcepto de eksestrariĝo de Henrik Håndlykken

Henrik la 4-an de aŭgusto sciigis, ke li volas retiriĝi de sia elektita posteno kiel anstataŭanto en la NEL-estraro. La estraro konstatas, ke li ne plu partoprenos en la estrara laboro.

### 4. Gasta vizito de nia Komitatano A, Kjell Peder Hoff

Kjell Peder estis invitita por informi pri la laboro en la komitato, interalie pri la decidoj rilate al oficejaj funkcioj de UEA. Li ankaŭ prezentus pensojn pri ekstera informado en NEL. Pro mikrofona problemo la informado pri la komitata laboro kaj ekstera informado ne okazis tiel amplekse, kiel planite. La formato de la Zoom-«babilejo» ne permesis profundan diskuton, nur koncizan interskribadon kun Kjell Peder pri tiuj temoj.

### 5. Ekonomio de NEL

Claude tiel ĉi resumis la ekonomian staton de NEL en retroŝta letero al la estraro la 6-an de oktobro (mallongigite):

- Plej verŝajne estos malprofito je ĉ. 10 000 kronoj por 2021.
- Povus esti eĉ 25 000 krona malprofito, se *Skagenfondene* ne estus tiom enspezigaj (dume kreskis je ĉ. 15000 kronoj ekde komenco de jaro)
- Kotizoj malkreskis je ĉ. 10%, enspezoj pri luigo de Esperantonia forestis kaj enkasiĝis nur unu donaco (je 5000 kronoj)
- Domluo draste altiĝis kaj kreskis je 50% kompare kun 2019. Aliaj kostoj estas pli-malpli samaj kiel kutime.
- Venontjare Esperantonia kostos unuafoje pli ol sumo de ĉiuj enspezoj de NEL (krom profito de *Skagenfondene*).

Ni decidis ne rekte iniciati monkolektan kampanjon inter la membroj, sed Bård prizorgos, ke aperu informa artikolo en *Norvega Esperantisto* pri la nuna ekonomia situacio de NEL kaj precipe pri la plialtigitaj kostoj, rilataj al la oficejo.

### 6. Esperantonia – la oficejo de NEL

La kostoj pri Esperantonia altiĝas, kaj ni konstatas, ke la nuna situacio ne estas daŭripova. Ni diskutis, ĉu okaze de eventuala forvendo de Esperantonia eblus trovi kontentigajn, alternativajn solvojn por la tri nunaj funkcioj de Esperantonia (kunvenejo / oficejo / stokejo). La oficeja demando estas forte ligita al la demando pri la ĝenerala agado de NEL. Por pli

bone difini la direkton de nia laboro, kaj ĉar ni malbone konas multajn membrojn, ni decidis provi telefone paroli kun granda parto de la membraro. Marianne proponas liston de priparolindaj demandoj aŭ temoj. La celo de tia enketado estas pli klare ekscii 1) kiel ni povas servi al niaj membroj, kaj 2) kiel la membroj povas kontribui al la laboro de NEL.

### **7. Landa kongreso venontjare**

La estraro konsideris jenajn alternativojn:

- neniŭ landa kunveno
- reta landa kunveno, iam printempe-somere
- fizika landa kunveno kiel parto de skandinava kongreso, la 28-an de majo kaj/aŭ la 29-an.

Ni elektis la duan alternativon. Ni opinias, ke la malfacila ekonomia kaj oficeja situacio estas diskutenda ne nur en la estraro, sed en la tuta membraro, kaj la diskuto pri eventualaj drastaj ŝanĝoj devas okazi kiel daŭra proceso dum iom longa tempo antaŭ ol oni faru decidon. Reta jarkunveno permesas pli multnombran partoprenon ol ĉeesta. Tamen, eventuala konkreta propono pri forvendo de la oficejo nepre estu pritraktata en ĉeesta jarkunveno.

### **8. Nordia seminario pri stato de naciaj lingvoj en supera edukado kaj scienco la 25-an de novembro**

Ni okazigos la seminarion kiel planite kaj invitos aliajn partopreni, interalie niajn nordiajn najbarojn.

### **9. Spond**

Ni konstatas, ke la estraranoj preferas diskuti estrarajn temojn retroŝte. Spond tamen ŝajnas esti la elektinda solvo por membraregistrado kaj aliaj organizaj taskoj. Lars surbaze de la membrolisto enmetos membroinformojn en Spond, post kio ni provos ĝiajn funkciojn en praktika uzo.

### **10. Instruado**

La eŭropa komisiono de UEA proponas kampanjon de zoom-kursoj por komencantoj. Ni decidis provi tion printempe en 2022. Bård pretas fari reklaman laboron por inviti partoprenantojn, ekzemple per pagenda anonco en Facebook kaj aliaj metodoj. Marianne eventuale pretas instrui.

### **11. Kampanjo por Internacia Esperanto-Tago ĉe Unesko**

Ne estas farita io pri la dokumentoj ricevitaj la 27-an de aŭgusto. Ni decidis prokrasti norvegan agadon ĝis la printempo, por nova kampanjo en 2022.

### **12. Norvega parlamentano parolanta Esperanton!**

Ni konstatas, ke kiel unua anstataŭanto al la norvega parlamento estas elektita Kristoffer Robin Haug, iama prezidanto de Studenta Esperanto-Societo ĉe Universitato de Oslo. En la venontaj ok monatoj, li estos konstanta reprezentanto pro forpermeso de Une Bastholm. Konsiderante liajn ampleksajn spertojn de diversaj kampoj ni pensas, ke li estonte povos doni al ni valorajn konsilojn kaj ideojn. Ni pripensos iam kontakti lin pri eventuala intervjuo por *Norvega Esperantisto*.

### **13. Ŝanĝoj ĉe Brønnøysund-registro**

En la registro estas ŝanĝitaj la informoj pri la estraro, sed ne la rubriko "signatur hver for seg", plej verŝajne ĉar tiu ŝanĝo ne estis menciita norveglingve en la protokolo sendita al Brønnøysund. Claude kaj Marianne korektos la aferon.

### **14. Retpoŝta servilo**

Jardar ekpreparis la movon, sed ankoraŭ ne faris ĉiujn necesajn esplorojn.

### **15. Gazetaraj komunikoj**

Nenio aperis en la lokaj gazetoj post kiam Bård kaj Marianne sendis komunikojn al lokaj gazetoj en Bergen kaj Tromsø.

### **16. Eventualaĵoj**

A – Claude iniciatis diskuton pri Grasrotandelen. Pro tempomanko ni prokrastas ĝin ĝis la venonta kunveno.

B – Lars raportis pri monpeto de afrika esperantoprojekto. Li respondos, ke ni ne monapogos la projekton.

### **17. Venonta estrara interkonsiliĝo**

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaudon la 9-an de decembro je 20.00 per Zoom.

Protokolis Marianne Lund